# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報


## Gastprelegis s-ro Jamaŝita Toŝihiro — pri la traduko de Rakontaro Genĝi ktp

La 21an de januaro, ni havis Hama-Rondan Vesperon, de la 17a ĝis la 18a horo, do pli mallonge ol kutime, sed tie ni povis aŭskulti interesajn aferojn de s-ro Jamaŝita Toŝihiro, loĝanta en Gubernio Kagoŝima (en la suda parto de Japanio). Estante estrarano de Japana Esperanto-Instituto, li havis ties estraran kunsidon en la 22a, kaj utiligante tion, li estis nia gasto.

Li faras diversajn aferojn, kaj pri tio prezentis ekrane. Ekzemple, kompilado de nova lernolibro de Esperanto, parta traduko de Rakontaro Genĝi, amromano antaŭ pli ol mil jaroj en Japanio. Lia traduko estas legebla en

http://esperas.info/index.php?genzi

Tiun kunsidon partoprenis 14, kaj poste, multaj el ili vizitis najbaran manĝejon por kune vespermanĝi.



S-ro Jamaŝita estas 3a de dekstre en la antaŭa vico.

foto liverita de s-ro Doi Hirokaz

## La 3-a Ĝenerala Kunsido

Nia Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama havis la 3-an Ĝeneralan Kunsidon en la 29a de jan. en ĉambro en la Kanagawa-Rodo-Plaza (Placo por Laboraj Aferoj de Gubernio Kanagawa), ĝuste en la kongresejo de la 104-a Japana Esperanto-Kongreso. Ĉeestis 17 personoj, kaj kun 30 mandatoj, jenaj decidoj estis faritaj.

1. Raporto kaj plano de la agadoj por 2016 kaj 2017
2. Kasraporto kaj buĝeto por 2016 kaj 2017
3. Elekto de la stabanoj.

Sekvis liberaj paroloj pri nia agado, i.a. pri la okazigota Japana Kongreso.

Post la Ĝenerala Kunsido, kelkaj el la ĉeestintoj vizitis "Novjaran Festenon" en ĉina restoracio Fukuyoken. Tien venis ankaŭ vjetnamino kun karesa nomo Midori, kaj s-ro Kimoto Jasuhiro el Nara.


Esperanto Jokohama

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas Esperanto Jokohama: Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nisisiba 4-17-9, Kanazawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-236-0017)
■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## La stabanoj de NPO Esperanto-Jokohama, valida ĝis la jarfino de 2017

**[la 6 estraranoj]**
s-ro Sibayama Zyun'iti (la prezidanto, kaj kun tasko informadi alilanden)
s-ino Miyazaki Hideko (la vicprezidanto, kaj kun tasko pri la bultenoj)
s-ino Doi Ĉieko (kun taskoj aranĝi "Hama-Rondan Vesperon", eldoni kaj vendi librojn)
s-ro Doi Hirokaz (ĝenerala direktoro)
s-ro Namba Fumiharu (kun taskoj financa kaj retej-administra)
s-ro Fuse Kentarou (kun tasko eduka)
**[la 2 revizoroj]**
s-ro Karibe Riichi
s-ro Tanigawa Hirosi

## Aldona Informo pri la 104-a Japana Esperanto-Kongreso

Dato: la 3a, 4a, 5a de novembro 2017
Kongresejo: en la mezo de la urbo
Kotizo de homoj el eksterlando: 2 000 enoj

Por aliĝo, turnu vin al Japana Esperanto-Instituto

(rete: jek2017@jei.or.jp, reteje: http://www.jei.or.jp/evento/2017/jek/)

Pri la urbo Jokohamo, turnu vin al ni, je info@esperanto.yokohama.

Ĉi-subaj informoj estas la plej freŝaj.

*Bankedo: la 4a vespere, en ĉina restoracio: kotizo 6500 enoj.

*Postkongresaj ekskursoj: Estas entute 3 kursoj, ĉiuj iras de 15:00 de la 5a tago, post la Fermo.

[kurso A] al Enoŝima, insulo transpontita de la lando (tranokto kaj turismo): 25 000 enoj

[kurso B-1] en Jokohamo: vespermanĝo dum ŝipveturado, tranokto en hotelo kaj turismo en Jokohama urbo: 23 000 enoj

[kurso B-2] en Jokohamo: vespermanĝo dum ŝipveturado (same de B-1), sen tranokto: 11 000 enoj




## Tiel Okazis En Internacia Forumo

La 5an de februaro, okaze de "Internacia Forumo 2017" de Jokohamo, kiu estas prelegaro de grupoj koncernantaj al internaciaj agadoj, nia grupo prelegis pri la temo: Kiaj estas la unuaj nacilingvaj lernolibroj al lernantoj en diversaj landoj. Surbaze de la kolektitaj lernolibroj, ni parolis pri nia intenco kaj rezulto, kun aldono de la prezento pri Esperanto. Krom 8 esperantistoj, 19 civitanoj aŭskultis ĝin.

## Niaj Planoj

*mar. 11 kaj 12 [Kanagawa Kenmin Sentaa] Foiro 2017 de la Civitanaj Agadoj
Budo por ekspozicio kaj kunvenĉambro estos pretaj por grupoj, kiuj agadas en la nomata loko, kaj ni estas unu el tiaj grupoj. Ni ekspozicios kaj klarigos pri Esperanto.

*mar. 18 [Kanagawa Kenmin Sentaa] Hama-Ronda Vespero
Ni parolos ĉefe pri la kolektado de lernolibroj.

# Leteroj

### el José Antonio Vergara (Ĉilio)

(al Doi Ĉieko kaj Sibayama Zyun'iti)

2017-01-22

Karaj jokohamanoj,

Jam de kelkaj monatoj mi regule ricevas vian interesan bultenon, kaj tiel informiĝis pri la jam okazinta ekspozicio pri element-lernejaj lingvo-lernolibroj el diversaj landoj.

Mi tre ĝojas ke ĝi denove okazos kadre de la 104-a Japana E-kongreso, espereble ĉi-foje kun pli da publiko, tiel kiel tiu bela iniciato meritas.

Mi rimarkis ke vi ambaŭ estas membroj de la LKK.

Dezirante sukceson en via laboro kiel LKK-anoj, mi devas konfesi al vi mian ĉiaman admiron por la persista kaj efika agademo de la japanaj esperantuloj. En mia memoro vigle restas la semajno kiun mi ĝuis en via urbo, okaze de la UK okazinta tie en la jaro 2007. Temis pri mia unua (kaj ĝis nun nura) vizito al via mirinda lando. Mi esperas ke iam en la estontumo mi povos denove veni en Japanion.

### el Joel Muhire (D R Kongo)

Saluton kara redaktoro de Tamtamo. Mi ĝojas kapti ĉi-tiun okazon danki vin pro via regula sendado de tiu bulteno al mi. Ĝi estas bona informdona kaj ne teda por nelegema esperantisto. Ĉu mi rajtas enskribi mian anoncon? Saluton al Doi Chieko, Tahira Masako kaj al aliaj. Jen mia foto. El Rutshuru- D R Kongo.



# Informo

## Esperantaj Elsendoj

Mizro Iwaya

Antaŭ pli ol 30 jaroj, mi aŭdis de iu veterana esperantisto ke li sukcesis kapti la ondon de Radio Varsovio. Tiutempe la sola kaptebla elsendo de Esperanto estis Radio Pekino, kaj relative multaj esperantistoj en Japanio klopodis aŭskulti ĝin per sia kurtonda radiaparato. Sed li ne kontentiĝis per tio. Li starigis grandan antenon kaj traserĉis la foran ĉielon ĝis li distingis la ondon de Varsovio per la esperanta parolado.

Pasis jaroj kaj nun ni havas facilan eblon kontaktiĝi kun interretaj elsendoj. Samtempe ni devas diri ke ekzistas multe da kanaloj kiuj faras esperantan elsendon. De nun mi volas prezenti famajn ekzemplojn el ili.

### Pola RetRadio

Mi kredas ke mi devas unue prezenti Polan RetRadion, ĉar ĝi havas longan tradicion kaj bonan kvaliton.

***http://pola-retradio.org/***

Laŭ Vikipedio ĝia unua elsendo okazis en 1925 kaj la uzataj lingvoj estis la pola kaj la angla. Ĝi vastigis sian terenon post tio kaj komencis esperantan elsendon en 1959. Fama s-ino Barbara Pietrzak aliĝis al ĝia skipo en 1968. Ĝi perdis financan subtenon en la jaro ĉirkaŭ 2011,

sed post zigzaga traserĉo ĝi sukcesis daŭrigi la elsendan agadon. S-ino Barbara Pietrzak restas redaktoro kaj ĉefa motoro de la agado.

La nova elsendo okazas du fojojn semajne. La longeco estas de 20 al 30 minutoj. Ĉefa enhavo estas pola novaĵo kaj intervjuo al famaj esperantistoj. Ĝi fariĝis ebla supozeble dank' al ĝenerala konateco de la redaktoro.

**Muzaiko**

Egale valora radio-stacio estas Muzaiko.

***http://muzaiko.info/***

Ĝi estas relative nova; fondita en 2011 kaj la ĉefa fondinto estis s-ino Veronika Poór! En tiu jaro mi ne antaŭsupozis ke ĝi daŭros longe. Des malpli konata estis la ĉefa fondinto, ĝis la jaro 2016. Ŝi fariĝis ĝenerala direktoro de UEA en tiu jaro! Tiu fakto rerimarkigis la radiostacion al mi. Ĝi daŭre sendadas ĉiutage diversajn paroladojn, foje malnovajn. Do la kvanto de la sonarkivo estas tre granda. Mi ne scias kie ili havigis ilin al si. Oni diras ke multaj kolektivaj klopodoj realigas la programon. Mi devus aldoni la ligitecon kun "kern.punkto". (Vidu sube)

**Ĉina Radio Internacia**

***http://esperanto.cri.cn/***

Ĝi havas longan historion. Antaŭ ĉio mi devas diri ke ĝi estas la plej granda esperanta elsendejo en la mondo kun financa subteno de la ŝtato. La skipo konsistas el ĉ. 10 personoj laŭ Vikipedio. Ĝi elsendas ĉiutage unu horon da programo en Esperanto. Ĉefa enhavo estas novaĵoj en Ĉinio, epizodo pri Esperanto, kurso de la ĉina lingvo, k.a. S-ino Wang Shanshan, kiu venis al Jokohama UK pro ĝia invito, estas unu el la redaktoroj.

**3ZZZ**

***http://melburno.org.au/3ZZZradio/***

Ĝi estas kolektiva nomo de elsendaj grupoj en Melburno en ĉ. 90 lingvoj. Ĝi komencis esperantan elsendon en 1989. La kvanto estas unu horo semajne kaj la ĉefa enhavo estas voĉlegado de diversaj periodaĵoj. Mi devas montri al vi ke ĝi fojfoje elektas nian bultenon "Novaĵoj Tamtamas" kaj voĉlegas iun artikolon el ĝi. Kial ili elektas nian bultenon? Supozeble ili havas nenian alternativon, ĉar en Japanio ekzistas nenia periodaĵo tutesperanta krom la nia.

**Kern.Punkto**

***https://kern.punkto.info/***

Ankaŭ tiu ĉi estas rimarkinda pro sia abundeco: ĉ. unu horo semajne. Krome ĝi estas administrata kredeble de nur du personoj: Maria kaj Johannes. Ili parolas pri certa temo kun speciala gasto. Se vi havas tempon, se la temo plaĉas al vi, vi povas aŭdi ilian babiladon.





↑ Maria Johannes ↑

**Esperanta Retradio**

***http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html***

Ĝi estas iniciatita de s-ro Anton Oberndorfer en 1998. Nun kelkaj direktoroj verkas eseojn kaj voĉlegas ilin ĉiutage. La enhavo estas relative facila kaj samtempe aperas ĝia teksto. Tial ĝi estas rekomendinda al *komencintoj* por lerni Esperanton plu.

**Novaĵoj de Japanio**

***http://okita.wakatono.jp/novajxo.htm***

Laste mi prezentas japanan retejon. Ĝi kutime montras nur tekstan novaĵon, sed ĝi montras voĉlegadon de la teksto unu fojon monate, fare de s-ino Matsuda Yōko (Macuda Joko). Ŝia prononco estas klara, la enhavo estas familiara al japanoj, ĝi montras tekston kune kun la sondosiero. Tial ankaŭ ĝi estas rekomendinda al *komencintoj*.

Ekzistas aliaj retejoj kiuj prezentas esperantan voĉelsendon. Sed mi ĉesas ĉi tie.